La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-11-22 n-ro 363

# Okaze de la Monda Infana Tago



Rusio kondamnas bombokanonan atakon kontraŭ ĝia ambasadorejo en Damasko

Ni trovu la plej bonajn Esperanto-lernilojn

La usona mararmeo bedaŭris petolaĵon fare de ĝia piloto

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉênkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

Okaze de la Monda Infana Tago
*La 20-a de novembro p. 03*

Rusio kondamnas bombokanonan atakon kontraŭ ĝia ambasadorejo en Damasko
*La Rusia ambasadorejo en Damasko estis bombardita plurajn fojojn p. 04*

La usona mararmeo bedaŭris petolaĵon fare de ĝia piloto
*“Neakceptebla” infaneca ŝercemo p. 04*

Hodiaŭe
*André Gide; Endre Ady; kaj Rusio p. 05*

Ni trovu la plej bonajn Esperanto-lernilojn
*Listo de la plej bonaj kaj konsilataj lerniloj de Esperanto p. 06*

# Okaze de la Monda Infana Tago

Hodiaŭ, la 20-a de novembro, 2017, estas Monda Infana Tago, kiu ekde 1954 markas la datrevenon de akcepto de la Konvencio pri Infanaj Rajtoj.



Laŭ analizo de Unicef (la Infana Fonduso de Unuiĝintaj Nacioj), kvankam la plimulto de la infanoj de la antaŭa generacio travivis senprecedencajn gajnojn se temas pri vivkondiĉoj, ankoraŭ unu el dekdu infanoj vivas en landoj kie iliaj perspektivoj estas pli malbonaj ol tiuj de iliaj gepatroj: “Kvankam ĉiu patro kaj patrino, ĉie, esperas pli bonajn perspektivojn al siaj infanoj ol la gepatroj spertis kiam ili mem junis, multaj infanoj vivas hodiaŭ en ekstrema malriĉo kaj restas ekster la lernejoj – eĉ kompare kun infanoj en tiuj samaj komunumoj antaŭ 20 jaroj.”

Kion ni esperantistoj povas fari por plibonigi la sorton de la infanoj de la mondo?

- Ami niajn infanojn, ŝirmi ilin, sed samtempe instrui al ili, ankaŭ per niaj ekzemploj, ke ili estas civitanoj de la mondo, kun respondeco pri la estontaj harmonio kaj prospero de tiu mondo.

- Disvastigi inter infanoj la mesaĝon de la esperantistoj, nome ke per Esperanto eblas komunikiĝi kun la mondo en egaleco kaj solidareco.

- Plani jam nun specialan aranĝon en via loka klubo aŭ landa asocio por festi la Internacian Infanan Tagon en 2018 kaj konsciigi la publikon pri ĝia graveco.

- Kunlabori kun Unicef aŭ aliaj organizaĵoj pri la bonfarto de infanoj en via lando.

- Helpi per nia mono kaj nia praktika helpo infanojn en nia propra medio kaj ankaŭ en aliaj mondopartoj, kiuj ne ĝuas la avantaĝojn kiujn ni ĝuas.

- Aŭskulti niajn infanojn, iliaj esperojn, kaj iliajn zorgojn.

Laŭ enketo de Unicef inter infanoj 9- ĝis 14-jaraj en 14 landoj, infanoj estas profunde maltrankvilaj pri tutmondaj evoluoj kiuj tuŝas ilin kaj iliajn samaĝulojn. Ili maltrankvilas pri perforto, malriĉo, kaj la fakto, ke iliaj voĉoj ne estas sufiĉe aŭdataj.

Mesaĝo de la oficejo de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj, Novjorko

# Rusio kondamnas bombokanonan atakon kontraŭ ĝia ambasadorejo en Damasko

Rusio lunde [20 nov 2017] kondamnis la lastatempan atakon kontraŭ ĝia ambasadorejo en la siria ĉefurbo Damasko, kiu kaŭzis damaĝon al iuj konstruaĵaj instalaĵoj.




Laŭ la Rusia Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj, obuso de bombokanono trafis la barilon de la Rusia ambasadorejo proksime al konstruaĵo de ĝia loĝkvartalo, kaŭzante damaĝojn al elektrotransmisia lineo kaj akvoproviza sistemo.

La ministerio aldonis, ke la ambasadorejo estis intence celita, kaj feliĉe, neniu el la personaro de la ambasadorejo estis vundita. Ĝi vokis la Sekurecan Konsilion de la Unuiĝintaj Nacioj kondamni la "senhontan agon".

La Rusia ambasadorejo en Damasko estis bombardita plurajn fojojn, de post kiam Moskvo komencis partopreni en kontraŭterorismaj operacoj en Sirio en septembro de 2015.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

# La usona mararmeo bedaŭris petolaĵon fare de ĝia piloto


Lastvendrede, la 17-an de novembro, la usona mararmeo taksis kiel "neakcepteblan" la infanecan ŝercemon de unu el siaj pilotoj, kiu desegnis grandan penison en la ĉielo, pere de la spuroj de sia militaviadilo. Pri tiu okazintaĵo iu patrino plendis antaŭ la filmiloj de la loka televidkanalo *KREM 2*, kiu siavice petis klarigon tiurilate de la militaj aŭtoritatoj.



Ĵaŭde [16 nov 2017] la loĝantoj de la urbeto *Okanogan* (subŝtato Vaŝingtonio, okcidente de Usono) iom time rimarkis la nekutimajn manovrojn plenumitaj de iu aviadilo *Boeing EA-18G Growlers*, apartenanta al armea aerbazo situanta proksime.

Post disvastigado de la bildoj tra interreto, la marinstitucio ekigis enketon pri tiu "nematura kaj nerespondeca ago".

Paulo Cesar Pires
esperanto.blog



## André Gide

**André Gide [ãdre ĵid] (naskiĝis la 22-an de novembro 1869 en Parizo, mortis la 19-an de februaro 1951 en Parizo) estis franca verkisto kaj tradukisto. En la jaro 1947 li gajnis la Premion Nobel pri Literaturo.**

**Vikipedio**


## Endre Ady



**Ady Endre estis unu el la plej grandaj hungaraj poetoj. Li naskiĝis la 22-an de novembro 1877 en komunumo** ***Érmindszent*****, hodiaŭ** ***Adyfalva*** **(rumana nomo: Ady Endre), kaj mortis en Budapeŝto la 27-an de januaro 1919.**

**En Esperanto aperis:** ***Endre Ady 1877-1919; La Morto de la Ĉielarko*****; kaj pluraj poemoj en** ***Hungara Antologio*****.**

**Vikipedio**



## Bildo de la tago

**Katedralo de Sankta Bazilo,**

**Ruĝa Placo en Moskvo, Rusio.**

**Vikipedio**

# Ni trovu la plej bonajn Esperanto-lernilojn

Dum la ILEI-kongreso en Busan, Sud-Koreio, en somero 2017, Katalin Kovats, redaktoro de *edukado.net* proponis formi laborgrupon, kiu post vasta enketado kaj profundaj analizoj, kompilos liston de la plej bonaj kaj konsilataj lerniloj de Esperanto. Per tiu listo ni intencas orienti instruantojn kaj lernantojn, kiuj inter la plurcent akireblaj lerniloj, pro manko de spertoj, malfacile trovas la valoraĵojn. Aliflanke ni volas indiki ankaŭ al la spertaj kolegoj novajn, por ili nekonatajn, valoraĵojn.

La laborgrupon gvidas Katalin Kovats, kiu nun turnas sin al la membroj de *edukado.net* kun la sekvaj petoj:

Bonvolu viziti nian Katalogon (vidu) (en la Biblioteko) kaj serĉi tie la librojn, kiujn vi konas, uzis aŭ uzas kaj pri kiuj vi havas spertojn. Lasu komenton sub la libroj, esprimu vian opinion, menciante la bonajn kaj eventuale la malbonajn flankojn de la lerniloj. Bonvolu nepre mencii en via komento, ĉu vi uzis la lernilon kiel instruanto aŭ kiel lernanto. Ne forgesu taksi la lernilon per aldono de steloj inter 1 kaj 5, kio helpas nin vidi la ĝeneralan takson. Normale 5 stelojn donu nur al tiu lernilo, kiun vi proponas aldoni al la listo de la plej bonaj lerniloj.

Se vi ne trovas la lernilon, kiun vi volas konsili por la listo aŭ kiun vi uzas kaj dezirus priopinii, bonvolu lasi komenton pri tio en la koncerna fadeno de nia Forumo (vidu). Menciu la aŭtoron kaj la titolon de la libro.

Se vi povus donaci al la Katalogo ekzempleron de la lernilo aŭ helpi al ni akiri ĝin, bonvolu ankaŭ tion indiki en via komento.

Ni antaŭdankas ĉiun, kiu per opinioj helpas nin kompili tiun liston.

Katalin Kovats
edukado.net